

- * Ĉar vagono laŭ la nocio 07511 en la franca originalo nomiĝas *remorque (ferroviaire)*, estiĝis ideo pri la termino *remorka vagono*.
- * La analizo de la termino eblas jene: **Remorka vagono** estas fervoja vagono tia, kvazaŭ ĝi **estus** remorko, ĉar ĝin trenas samtipa motorvagono, kiel motortramo trenas tramremorkon.

Kiel nomi du specojn de remorka vagono?

Ekzistas remorkaj vagonoj kun kaj sen kondukistejo por stiri motorvagonon.

La ĉeestintoj jesis pri jenaj terminoj:

- remorka vagono kun kondukistejo (07513): *remorka stirvagono*
 remorka vagono sen kondukistejo: *simpla remorka vagono*

Ĉu uzi la sufikson *-um-*?

Kvankam Jan Werner kaj Ludoviko Sekereš perletere ne subtenis la terminproponojn *trakciumaj veturiloj* kaj *motoruma vagono*, la ĉeestintoj en Plovdiv kontentas pri ili, kiel pasintjare la ĉeestintoj en Tábor.

La terminoj estu tradukoj de la francaj originaloj

- *matériel moteur* = trakciloj kaj trakcil-aldonaj veturiloj (RaillLexic 05498) kaj
- *voiture motrice* = vagono de motorvagonaro (RaillLexic 09895).

Karaj geamikoj,

la sekva TeKu 118 aperos en novembro 2002, post Terminologia seminario kaj Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Dobřichovice (CZ).

Ĝis tiam ĉion bonan por vi, kaj ĝojigan kunagon!

Amike salutas:

Heinz Hoffmann

Terminara Kuriero

TeKu 117

Julio 2002

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

jen la rezultoj de la 54a IFEF-kongreso en Plovdiv. Tie okazis kvar kunsidoj de Faka Komisiono. Ĉe ili partoprenis 11 sekcianoj kaj 15 gastoj el 12 landoj. Bonvolu legu atente la sekvajn artikolojn.

Kiu ricevu Terminaran Kurieron?

Laŭ la diro, ke Terminara Kuriero estas interna komunikilo de Terminara Sekcio, ĝis nun ricevis la periodaĵon tiuj, kiuj pretas kunlabori en nia sekcio - do la sekcianoj - kaj aliaj, kiuj speciale petis pri alsendado.


En Plovdiv ni diskutis kaj decidis plivastigi la adresataron je gekolegoj en landoj, kie ne vivas sekcianoj. Martin Stuppniĝ (AT) atentigis pri precipa graveco, integri ĉinajn gekolegojn. Tiurilate legu la artikolon de Han Zuwu en INTERNACIA FERVOJISTO 2002.3., paĝo 45. Celo estas, ke ĉiu landa asocio de IFEF

- daŭre sciu pri kurantaj terminologiaj agoj de fervojistoj-esperantistoj,
- povu publike argumenti pri tio,
- varbu novajn kunlaborantojn en siaj rondoj.

Sekve ĉi tiu TeKu 117 kaj kelkaj lastaj numeroj estas aldone sendataj al konataj adresoj en Bulgario, Ĉinio, Hispanio, Kroatio, Pollando kaj Svisio. Ni petas la ricevantojn

- * aŭ konfirmi sian pretecon esti la kontaktulo pri terminaraj demandoj en sia landa IFEF-asocio,
- * aŭ proponi alian kontaktulon.

Ĉiu demetu



sian
ovon!

Ni demandas ankaŭ sekcianojn, kiuj ja regule ricevas nian komunikilon, ĉu ni sendu Terminaran Kurieron **aldone** al alia adresato, por pli efektiviĝi deziratajn kontaktojn.

Aperis nova PIV!

Jam en aprilo 1998 nia sekcio finis fervojfakan revizion de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV), sendis la 20-paĝan rezulton al la responsuloj en Francio. Nun finfine la nova PIV estas produktita fare de la eldonejo KAVA-PECH de Petr Chrdle (CZ), kaj estis inaŭgurata dum la lasta SAT-kongreso. Petro Chrdle aĉetis de SAT 150 ekzemplerojn por pluvendi ilin. La libroprezo estas 70 eŭroj. Sendaĵo kun ĝis 3 libroj kostas 12 eŭrojn. Plej simpla pagmaniero estas per UEA-konto (kape-p, nepre kun indiko de la aldonita fakturo). Ankaŭ eblas mendi libron kaj sensende ricevi ĝin nur dum Esperanto-aranĝo en Ĉeĥio (IBIRE, Terminologia seminario, KAEST).

Jen la adreso: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice
(rete: <chrdle@kava-pech.cz>)

Detaloj pri akcepto/malakcepto de niaj reviziaj proponoj, kaj pri aliaj nin interesantaj enhavoj aperos en TeKu 118.

Suplementoj de nia FERVOJA TERMINARO


Nia vicprezidanto István Gulyás disdonis en Plovdiv ĝis nun pretajn dulingvajn suplementojn de nia FERVOJA TERMINARO. En tiuj suplementoj troviĝas la 303 novaj nocioj laŭ RailLexic 12357 ... 12689. Ĉiu volumo enhavas Esperanton kiel unuan, kaj 1 el 13 nacilingvojn kiel duan lingvojn. Kombinante tiun suplementon kun la libro FERVOJA TERMINARO de 1997, oni havas la kvanton laŭ aktuala 3a eldono de RailLexic.

La suplementaj terminoj respondas al la unuaj proponoj en la bazfolio de januaro 1999. Ili estis enigataj por obei unuan limdaton de Internacia Fervojunio. Poste UIC ŝovis la limdaton al junio 1999. Dum tiu duonjaro nia sekcio reviziis la unuajn proponojn laŭ la decidita labormetodo. La rezulto de kontraŭproponoj, elektoj kaj kongresa diskutado en Le Mans estis 113 terminŝanĝoj. Kvankam ni sendis jam fine de majo 1999 korektoliston al la hungara MÁV, bedaŭrinde - laŭ nuna konstato - ne sukcesis enigi tiujn 113 korektojn en la datumbanko.


Ĉu krei la terminon *remorka vagono* ?

La eksplikoj en TeKu 116 sur paĝoj 3/4 pri motivo por krei kaj uzi la terminon *remorka vagono*, estas subtenataj de la ĉeestintoj en Plovdiv. Jen ripete la resumo:

- * Ni obeu al PIV, ke remorko estas veturilo trenata de motorŝipo, biciklo, aŭtomobilo aŭ tramo. Sekve ĝi ne estas fervoja veturilo.
- * Ni nomu ĉian fervojan **transportveturilon vagono**. Ĝi povas esti aŭ motorvagono aŭ senmotora vagono.
- * Serĉata estas termino por tia senmotora vagono, kia laŭtipe estas destinata por uzo nur kun samtipa motorvagono (RailLexic 07511). Do temas pri senmotora vagono por motorvagonaro.



motortramo kaj tramremorko



motorvagono kaj remorka vagono

Terminaraj traktoj dum 54a IFEF-kongreso

Per kio anstataŭigi la terminon *trakaparato* ?

Laurent Vignaud klarigis, ke la franca originalo 00406 *appareil de voie* koncernas supernocion pri trakforkoj kaj trakokrucaĵoj, ne ankaŭ pri aliaj aparatoj en aŭ ĉe trako. La ĝisnuna termino *trakaparato* ne plaĉas al ĉiuj diskutintoj. Emil Tudorache forte subtenas la terminproponon *traknodo*. La aliaj preferas rezigni pri termino - kiel en pluraj faklingvoj (angla, dana, germana, nederlanda, serba, ...), kaj anstataŭe uzi la perifrazon *trakforko aŭ trakokrucaĵo*. En postkongresa letero Ludoviko Sekereŝ nove proponis la esprimon *trakinŝtalaĵo (trakforko aŭ trakokrucaĵo)*. Por decido pri korekto en RailLexic estas tempo ĝis ties 4a eldono.


Ĉu disigi la triradikan terminon *kructrakforko* ?

Koncerne la nocion 09392 la ĉeestintoj kontentas pri la termino *kructrakforko* kun gramatika analizo „trakforko el kruco“. Al ili ne plaĉas disigo per adjektivo *kruca ... , krucaĵa ... , kruciĝa ...*.



Kiel nomi vojojn tra trakforko?

La nocioj 01035 kaj 01036 certe koncernas geometrian aspekton de diversaj vojoj tra trakforko. La vojo laŭ 01036 (franca originalo: *branche directe*) estas rekta en rektaj trakforkoj, aŭ pli grandradiusa en kurbaj trakforkoj (ĉar kurbigita, origine rekta vojo). La vojo laŭ 01035 (franca originalo: *branche dérivée*) estas ĉiukaze kurba, en kurbaj trakforkoj kun malpli granda radiuso. Sciu, ke ambaŭ nocioj estas sole geometriaj, do tute ne koncernas destinton de la vojo (ĉefa, duaranga) tra trakforko enkonstruita en trakaro.



Pri la nomoj ne sukcesis klara interkonsento en Plovdiv. Ludoviko Sekereŝ forte volas lasi la nunan Esperanto-solvon: 01036 = *rekta vojo*; 01035 = *devia vojo*. Sed tiel estas problemeto, ĉar la adjektivo *rekta* estas dusence uzata en la sama subfako: En *rekta trakforko* ĝi respondas al „rekta 1“ en PIV („konservanta ĉiam unu saman direkton simile al streĉita ŝnuro“). En *rekta vojo* ĝi respondas al „rekta 3“ en PIV („senpera; funkcianta sen interveno de perilo“).

Por havigi pli stabilajn argumentojn, estas jena **tasko**: Bonvolu esplori la koncernajn terminojn en via nacia lingvo, kaj traduki ilin al Esperanto! Post

kolekto de sufiĉa nombro, ni decidu laŭ internacie dominantaj solvo. Atentu, ke multaj naciaj tradukoj en RailLexic estas malĝustaj, ĉar mankas difinoj.

Jen la germana solvo: 01036 *Stammgleis* = trunktrako
01035 *Zweiggleis* = branĉtrako

Laŭ la estonta decido eblos ankaŭ respondi la demandojn pri nomoj por la du specoj de kructrakforko laŭ 09398 kaj 09393, ĉu *unudevia / dudevia kructrakforko*, ĉu *unubranĉa / dubranĉa kructrakforko*, ĉu aliaj terminoj.

Kiel nomi du specojn de kurbaj trakforkoj?

En RailLexic oni forgesis enigi la du nociojn pri kontraŭaj geometriaj specoj de kurbaj trakforkoj laŭ la apudaj simboloj. En la maldekstra bildo, ambaŭ radiusoj troviĝas ĉe unu flanko de la trakforko. En la dekstra bildo, po unu radiuso troviĝas ambaŭflanke. Pri la terminaj epitetoj ne sukcesis interkonsento en Plovdiv. Aperis la proponoj *internenkurba / eksterenkurba ...*, *enkurba / elkurba ...*, *kunkurba / elkurba ...*, *unufanken kurba / ambaŭflanken kurba ...*.




Certe en ĉiuj naciaj faklingvoj ekzistas la koncernaj terminoj, ĉar ili estas nepre bezonataj en reglamentoj kaj por geometriaj ekvacioj. Do **tasko** por vi estas esplori la koncernajn terminojn en via nacia lingvo kaj traduki ilin.

Jen la germana solvo: *Innenbogenweiche* = internenkurba trakforko
Außenbogenweiche = eksterenkurba trakforko

Ĉu preferi (mal)dekstrabranĉa trakforko aŭ trakforko (mal)dekstren?

Por la nocioj 01042 kaj 01043, la ĉeestintoj proponas anstataŭigi la ĝisnunan komplikan epiteton (mal)dekstrabranĉa ... per ... (mal)dekstren. Tiu decido ne tuŝas la ĝis nun ne solvitan demandon, ĉu preferi la terminon *branĉvojo* anstataŭ *devia vojo* por 01035 (vidu sur paĝo 3).



Kia trakforko estas „simpla“?

La francaj originaloj 00181 *aiguillage ordinaire*; *aiguillage simple* kaj 01041 *branchement simple*; *branchement (à) deux voies* ne sufiĉe klarigas la nocioenhavojn. Ĉefe restas la demando, ĉu sole **rekta** duvojoj trakforkoj (01042, 01043) estas „simplaj“, aŭ ĉu la vorto *simpla* estas nur sinonimo al *duvoja*, egale ĉu la trakforko estas rekta aŭ kurba.

Certe en pluraj naciaj faklingvoj ekzistas ekvivalento de *simpla trakforko*. Via **tasko** estas, esplori en via lando la klaran signifon de tio. En Germanio *einfache Weiche* estas rekta duvoja trakforko.